

# ESPERANTO

sub la suda kruco

decembro 2021





# ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA  
ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 28[4] numero 144 decembro 2021

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktisto: Terry Manley

Provlegantoj: Vera Payne, Donald Rogers

Kunordigisto: Jonathan Cooper, uzante dezajnon de Joanne Johns

Kontaktadreso: [esk@esperanto.org.au](mailto:esk@esperanto.org.au)

AEA – ESK

GPO Box 2122

Melbourne, Victoria 3001

Australia

## Abonoj kaj pasintaj numeroj

*Esperanto sub la Suda Kruc* estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA: [esperanto.org.au](http://esperanto.org.au) / [info@esperanto.org.au](mailto:info@esperanto.org.au)

NZEa: [www.esperanto.org.nz](http://www.esperanto.org.nz) / [esperantonewzealand@gmail.com](mailto:esperantonewzealand@gmail.com)

## Kiel kontribui al Esperanto sub la Suda Kruc

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, [esk@esperanto.org.au](mailto:esk@esperanto.org.au)

Artikoloj kaj originalaj en Esperanto kaj tradukitaj en Esperanton estas akcepteblaj. Sed NE sendu permaŝinajn tradukojn (ekzemple per Google Translate).

## Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15a de februaro 2022

La redaktistoj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Pri la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2021 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj  
ISSN 2207-0087

# ENHAVO

|                                        |    |
|----------------------------------------|----|
| Antaŭparolo                            | 04 |
| Floroj                                 | 05 |
| La virino kaj la policisto             | 08 |
| Hazel Green 1946–2021                  | 09 |
| Pasio por lingvoj: Danny Kane          | 11 |
| Sekvu nin en Instagramo                | 12 |
| Danĝera vivo de pilotoj                | 13 |
| Ĉerizsupro                             | 14 |
| Plantoj konstruiĝas el aero kaj akvo   | 16 |
| Biologia nomenklature por Aŭstralio    | 18 |
| Omaĝo al John W Adams 1933–2021        | 20 |
| Aŭstralio/Nov-Zelanda Hibrida Kongreso | 22 |

Je la 22a horo, la 14an de Oktobro, ŝtormo trairis mian urbon Armidale. Mi estis iranta al la lito sed aŭdis hajlon, kiu trafas la tegmenton de la verando, kaj rapide eliris por savi miajn plantidojn, kiujn mi lasis sur la ŝtupo ekstere. Mi decidis ne plu esplori pro la ŝtormo kaj iris al la lito. Kuŝante tie, mi iom timis pro la ventego ekstere ĉar mi scias ke estas granda arbo ĉe tiu flanko de la domo. Foje mi aŭdis frapojn sed mallaŭtajn. La sonoj verŝajne forportiĝis per la ventego. Matene estis bruado de maŝinoj kaj ĉensegiloj en kvartalo proksima. En mia malantaŭa korto mi rimarkis branĉon de arbo kiu falis apud mia abelujo. Bonŝance mi movis la abelujojn antaŭ monato, ĉar alie ĝi estus trafita de tiu sufiĉe granda branĉo. Preter la malantaŭa barilo mi rimarkis ke kelkaj najbaraj arboj suferis eĉ pli ol la mia. Apud mia ĝardenbudo estis pordo simila al ties sed ĝi ne apartenas al la mia. Mi ankoraŭ ne scias de kie ĝi alvenis. Ne de proksima najbaro.

Mi kaj la edzino decidis marŝi kaj esplori kio okazis. Ho ve, en la apuda strato estis tiom da ruino: tegmentoj forŝiritaj,

arboj torde disŝiritaj, bariloj defaligitaj. Ĉie estis teamoj pri krizostato, forhakantaj la arbojn, kovrantaj la tegmentojn, kaj riparantaj la elektrodratojn. La komenca laboro daŭris tagojn, kaj riparado verŝajne daŭros monatojn.

Iu fotis videon de la ŝtormo de proksime. Estis nokte do mallume, sed dum fulmo oni povas vidi funelon de nubo kun pinto proksima al la grundo. Tuj poste estis sparkoj el falantaj elektrodratoj. Malbonŝance tiu kirlventego trafis partojn de la urbo kaj difektis multajn domojn, konstruaĵojn ĉe la universitato, kaj arbojn. Sed tre bonŝance por ni, ni estis ĉe la rando de la trafloko. Iu ĉe la universitato esploris pri la ŝtormvojo kaj ĝi estis proksimume 25 kilometrojn longa.

La fako de meteorologio informas ke okazas proksimume 60 kirlventegoj jare en Aŭstralio, kompare kun 1200 en Usono. Multaj ne trafas loĝlokojn, do ne estas rimarkindaj por homoj. Ĉu pli okazas nuntempe estas ankoraŭ observata, sed kiam oni estas tiel proksima al evento ŝajnas iom preme.



### Informo pri fotoj

- 1 Telopeo – Helen Webb
- 4 Post la ŝtormo – Helen Webb
- 5 Krizantemoj – Katja Steele
- 7 Violetoj – Katja Steele
- 8 Pietro De Grandi per Unsplash.com (detalo)
- 9 La familio de Hazel Green
- 11 Made in China Journal
- 12 NZEA Instagram
- 13 Kevin Bluer per Unsplash.com (detalo)

- 14 La rikolto de 2013 – retejo Cherry Top
- 16 Rasbak de nederlanda Vikipedio
- 19 Pearce/Fairfax Media
- 20 Marumi Smith
- 22 Esperanto-Domo – Jonathan Cooper, Alekso Miller – Gloria Ann Hankins, Plaĝo Manly – John (Shelbaso) per Flickr.com (detalo)
- 24 Jonny M kaj kongresanoj ĉe la Trilanda Kongreso, Bandung, 2016 – Kam Lee



Kio estas floro? Biologie ĝi enhavas la reproduktajn organojn de la planto kaj produktas semojn kaj kutime portas petalojn. Sed eble pli ofte ni pensas pri ĝi kiel enkarniĝo de beleco.

Floroj estas grava parto de homaj ritoj. Poleno trovita en antikvaj tomboj sugestas, ke la floroj akompanis jam la neandertalajn enterigojn. En antikva Romo oni havis festivalon al diino Flora.

Ĝis nun floroj restas grava parto de nia vivo en tempoj de altaj emocioj: ĉe naskiĝoj, malsanoj, mortoj, geedziĝoj, naskiĝtagoj, datrevenoj. Famas la florfestivaloj de Hispanio, la uzo de florĉenoj en la hinda kaj havaja vivoj. Vi certe aŭdis pri la pendantaj ĝardenoj de Babilono, pri la ornamaĵoj de Alhambro kaj daŭre renkontadas florojn en la plej diversaj artaĵoj.

“Nur vivi ne estas sufiĉe; oni devas havi sunbrilon, liberecon kaj malgrandan floron,” skribis Hans Christian Andersen

(dana verkisto konata precipe pro siaj fabeloj).

Floroj sanigas. Tion scias la ĝardenistoj kaj pravas nun ankaŭ la scienco. La pacientoj en malsanulejaj ĉambroj kun floroj bezonas malpli da medikamentoj, estas malpli streĉitaj kaj havas malpli altan sangopremon kaj pulson ol la pacientoj en ĉambroj sen floroj.

Floroj feliĉigas nin. “La tero ridas per floroj,” diris Ralph Waldo Emerson (usona eseisto, poeto, filozofo). Studoj en la evolucia psikologio montras, ke doni florojn al virino elvokas la “veran” ridonrideton, ne nur la “bonkonduktan”, kaj ke virinoj ricevantaj florojn raportis pri pli pozitiva humoro dum la venontaj tri tagoj.

Donaco de floroj ankaŭ plibonigas epizodan memoron ĉe maljunaj homoj. Studoj el Nederlando montras, ke la vespermanĝantoj en restoracioj, kie oni havas sur la tabloj florojn, ŝajnas esti en pli bona humoro.

“Kiam vi havas nur du cendojn restantaj en la tuta mondo, aĉetu per unu panbultkon kaj lilion per la alia,” konsilas ĉina proverbo.

El ĉiuj flor-nomoj, unu el la plej belaj estas forget-me-not (“miozoto” en Esperanto), *ne m'oubliez pas* en la franca, *nontiscordardime* en la itala, *nomeolvides* en la hispana. Germana popola rakonto diras, ke kavaliro plukis bukedon de malgrandaj blujaj floroj por sia amatino kiam ili promenis sur riverbordo. Li glitis, falis en la riveron kaj, dronante, kriis al ŝi “*Vergiss mein nicht*” (ne forgesu min). Ankaŭ la hungara nomo *nefelejcs* [nefelejĉ] signifas “ne forgesu min”.

## Lingvo de floroj

Florlingvo donas apartajn signifojn al floroj. En la viktoria epoko, la “parolantaj bukedoj” estis tre popularaj. Jen kelkaj ekzemploj pri tio, kion eblas esprimi per floro:

**violo** – fideleco, modesteco

**kamelio** – dankemo, beleco

**blanka rozo** – senkulpeco, amikeco, humileco

**ruĝa rozo** – amo, kuraĝo

**ciklameno** – adiaŭo

**hortensio** – krueleco, malboneco

**irido** – saĝeco, kredo

**kakto** – eltenemo;

**gladiolo** – memorado, forteco

**krizantemo** – optimismo, feliĉo, longa vivo

**lilio** – riĉeco, pureco, fiereco

**orkideo** – amo, longa vivo (simbolo de infano en la ĉina)

**tulipo** – famo, perfekta amanto

**rosmareno** – rememoro, renaskiĝo.

La 21a jarcento alportis kelkajn danĝerojn al la floroj. La jarsezonoj

estas malpli tipaj, plantoj ne scias, en kiu sezono ili aktuale estas. Florado devus esti agordita kun la ĉeesto de papilioj, abeloj kaj aliaj polenantoj, sed ĉar la plantoj floras pli frue, tiu ĉi harmonio estas rompita. Jam nun pligrandiĝas la tempospaco inter la pleja florado kaj abundo de papilioj. Plia rezulto de la klimata ŝanĝo estos, ke la floroj perdos siajn odor-molekulojn, rezulte de pliigita ĉe-tera ozontavolo. Proksimume unu el kvin plantaj specioj sur la tero alfrontas malaperon. En la moderna tempo okazas pli granda “floricido” ol iam ajn en la historio.

Estas ŝoke aŭdi pri la malamo de floroj, ekzemple kiam Mao kondamnis ilin kaj deklaris, ke floroj estas feŭdaj. Kontraŭe, hungara proverbo diras, ke kiu ŝatas florojn, tiu ne povas esti malbona homo.

Laŭ *Feng Shui*, malnova ĉina instruo, la vivantaj plantoj rekte influas la energion de homoj. Dume la sekigitaj floroj estas vampiroj, kiuj elsuĉas energion. La artefaritaj plantoj estas uzeblaj, oni metu ilin tien, kie la vivantaj ne eltenus, ekz. apud fajron. Kiuj floroj alportas plej multe da feliĉo kaj harmonio? Lotuso, krizantemo, orkideo, magnolio. Floroj sur la fenestra breto baras la eksteran negativan energion kaj helpas plenigi la domon per pozitiveco.

Floroj sufiĉe ofte rolis ankaŭ en la historio. Ekzemple, rozo estas ofta politika simbolo (unu el la plej sangaj konfliktoj de Anglio estis la batalo inter la blanka kaj ruĝa rozoj). Rozo simbolis ankaŭ la kristanan martirecon.

Jen interesaĵo pri la lilioj: la unuajn plantojn de lilioj portis hejmen la krucmilitistoj. Popularigis ilin la tiama reĝo Louis VII kaj unue oni nomis ilin laŭ la reĝo – poste la nomo iĝis *Lis*. De tiam

la francaj soldatoj portis tiun floron kaj la lilio iĝis simbolo de la bourbona reĝa domo en la 17a jarcento.

La nacia flora emblemo de Aŭstralio estas akacio (golden wattle, *Acacia pycnantha Benth.*). Kiam ĝi floras, ĝi montras la naciajn kolorojn: verdan kaj oran. Se vi hezitas pri la Esperantaj nomoj de la aliaj aŭstraliaj plantoj, jen iom da helpo: waratah – telopeo (simbolo de NSK); banksia – banksio, eucalyptus – eŭkalipto; bottlebrush – kalistemo; kangaroo paw – anigozanto.

## **Kelkaj fontoj**

*Australian & New Zealand Esperanto Dictionary* (Ralph Harry & Brian Fox)

Revuo: *Country Life*, Aŭgusto 2019

Retejo: [www.biobolt-webaruhaz.hu](http://www.biobolt-webaruhaz.hu).



# La virino kaj la policisto

NICOLE ELSE (SIDNEJO) – TRADUKITA EL LA FRANCA

Adamo ŝatas fiŝkapti. Li ĵus pasigis kelkajn horojn en sia boato sur granda lago, fiŝkaptante. Nun li estas ree hejme kaj spektas televidon. Estas bela tago. Lia edzino decidas, ke estus agrable legi libron en la boato tute trankvile meze de la lago. Do tion ŝi faras. Post iom da tempo polica boato alproksimiĝas.

“Kion vi faras tie ĉi?” demandas la policisto.

“Ĉu tion vi ne vidas?  
Mi legas libron.”

“Vi estas en parto de la lago, kie oni ne rajtas fiŝkapti. Mi devos doni al vi monpunon.”

“Sed mi ne fiŝkaptas; mi legas libron.”

“Mi vidas, ke en via boato estas la iloj necesaj por fiŝkapti. Mi do devos monpuni vin.”

“Monpuni min ĉar mi legas libron?”

“Vi estas en parto kie oni ne rajtas fiŝkapti. Je iu ajn momento vi povus halti legi kaj ekfiŝkapti.”

“Se vi donos al mi monpunon, mi akuzos vin pri seksa perforto.”

“Sed mi eĉ ne tuŝis vin.”

“Tio veras, sed vi havas la ilon, per kiu vi povus seksperforti min, je iu ajn momento vi povus decidi uzi ĝin.”

La policisto tiam diras, “Adiaŭ, havu bonan legadon,” kaj rapide forveturas.

**Moralo:** Ne provu diskuti kun virino, kiu ŝatas legi librojn. Ŝi supozeble kapablas pensi kaj bone argumenti.



# Hazel Green 1946–2021

## TERRY MANLEY (ARMIDALE)

Loĝinto de Oakey, Kvinslando. Forpasis pace je 23a de Aŭgusto 2021, aĝo 75 jaroj.

Kare amata edzino de Paul. Tre amata patrino kaj bopatrino de Geoff, Heather kaj Ben, Michelle kaj Will. Amanta “Avinjo” de Imogen, Charlotte, Henry kaj Skye.

Dum la funebraj nekrologoj, la filinoj klarigis ke Hazel elektis nomiĝi “avinjo” kiam naskiĝis ŝiaj genepoj. Klara indiko al ŝia dediĉo al Esperanto.

Ripete tra la honorigaj vortoj pri Hazel estas la vortoj: entuziasma, helpema patrino por la familianoj kaj volontulo por multaj organizaĵoj. Sed ankaŭ modesta kaj tre kapabla. Kvankam en sia fina jaro de la lernejo, ŝi estis unu el la dekduo de elstaruloj (fakte la unua ino) por Kvinslando, ŝi ne fanfaronis pri tio. Ĝis la funebra servo, malmultaj sciis pri tio. Ŝi diplomiĝis kiel bestkuracisto ĉe la Universitato de Kvinslando. Ŝi renkontis Paul, sia edzo dum 49 jaroj, ĉe la bestkuracejo en Oakey, Kvinslando.

Kiam naskiĝis gefiloj, Hazel decidis

dediĉi sin al sia familio kaj volontulaj organizaĵoj anstataŭ labori ekster la domo. Ŝi entuziasme partoprenis en la lecionoj kun siaj infanoj – kiel ludi pianon, kiel naĝi kaj kiel funkciigi amatoran radioaparaton. Tion ŝi faris kvankam ŝi

jam bone ludis la pianon kaj sciis kiel naĝi. Pri la radio ŝi lernis kun sia filo, Geoff.

Muziko estis kerna afero en ŝia vivo. Ŝi ludis la pianon kaj la gitaron kaj povis akompani kantistojn en grupoj ĉe la preĝejo, en la domo (kristnaska kantado estis familia tradicio nepre farenda por ŝi), kaj ĉe lokaj muzikprezentadoj. Sciante tion oni atendus ke ŝi estis religiulo sed ne vere. Estis la kantado kaj muziko kiuj allogis ŝin al tiaj grupoj komence sed poste la amikoj kiujn ŝi renkontis tie. Hazel iris al fleghejmoj por

aĝuloj, gvidante kantadon kaj ludante gitaron aŭ pianon.

Volontule ŝi ankaŭ helpis pri la organizaĵo Ruĝa Kruco, la instruado de la angla al enmigrantoj, la rubaĵkolekto de sur la stratoj kaj el naturejoj je Aŭstralia Tago (kaj iam ajn fakte) kaj plantado



de indiĝenaj plantoj. En sia infaneco ŝi ne tre aktivis sporte, sed kiel emirito ŝi partoprenis en kurado kaj biciklado en Oakey. Ŝi poste helpis pri la organizado de komunaj kuradoj lokaj. Pro la frua agado volontule, en 1994 ŝi ricevis la honorigon kiel loka Civitano de la Jaro, je Aŭstralia Tago.

Dum la nekrologoj, krom mencio de ŝia elekto nomiĝi "avinjo", la filinoj ankaŭ menciis ke unu el la plej bonaj donacoj naskiĝtagaj estis kiam la edzo Paul demandis al ŝi "Ĉu vi deziras teon?" en Esperanto. Volontule Hazel ankaŭ dediĉis multon al Esperanto. Inter 1996 kaj 1998 Hazel faris la AEA-ajn ekzamenojn ricevinte honoron en la Elementa en 1996 kaj la Supera en 1998. (Paul sukcesis en la Baza en 1998). Kiam Kep Enderby petis al Hazel helpi Dianne Lukes pri la AEA-aj Korespondaj Kursoj en 1996 ŝi akceptis. Post 1998 Hazel sole respondecis pri la organizado de la Kursoj kaj daŭre faris tion ĝis ĝi ne plu funkciis perpapere. Inter 2001 kaj 2003 Hazel instruis Esperanton

en la elementa Kingsthorpe ŝtatlernejo. En la samaj jaroj ŝi estis sekretario de la Esperanto Federacio de Kvinslando. En 2004 ŝi estis LKKano por la AEA Kongreso en Redcliffe Kvinslando. En 2005 ŝi iĝis Fratulo de AEA. Do resume ŝi ja estis entuziasma kaj grava rolulo en la movado dum multaj jaroj.

Mi memoras Hazel kiel helpema, ĝentila kaj feliĉa homo kiu ĉiam alportis sian energion kaj entuziasmon al aferoj. Ŝi helpis min en 2006 kiam mi deziris prezenti ion per komputilo al kongreso. Ankaŭ kiam mi kantis kun ŝi kaj gesinjoroj Bishop, Hazel donis tempon por helpi min pri mia parto. Kvankam bona muzikisto ŝi ĉiam estis tiom modesta pri tia kapablo. Kiam mi komencis kolekti materialon por ĝisdatigi la historion de AEA en 2005 Hazel estis elstare helpema pri la kvinslanda ĉapitro kaj verkis la plejparton de tio. Mi certas ke aliaj havis similajn spertojn pri ŝia helpo.

Do restu pace, Hazel, kaj dankojn pro viaj inspiraj jaroj en Esperantujo.



# Pasio por lingvoj: La vivo de Daniel (Danny) Kane 1948–2021

**CHARLES STEVENSON (ADELAJDO)**

Kiam Katja Steele sugestis, ke mi devus verki biografion pri Danny Kane ni ambaŭ ne sciis kiel granda estus la klopodo.

Ĉar Danny tute ne sin paradis, oni ne sciis ke li estis ja eminentulo. Ŝajnas ke nur la akademia mondo sciis pri lia grava verkaĵo pri la malnova ĉina lingvo. Danny tradukis forgesitan malnovan ĉinan skribaĵon same gravan kiel la ŝtono Rosetta de egiptologio.

Li esperantistiĝis je la aĝo de 14. Tuj poste, li lernis la italan, hispanan kaj nederlandan lingvojn. Ĉe la universitato, li studis kaj la rusan kaj la ĉinan.

Lia doktoriĝo estis bazo por grava studo de la malnova ĉina lingvo, la ĥitana, kaj ĝia skribaĵo.

Laŭ Garry Woodard, la aŭstralia ambasadoro en Beijing dum la samaj jaroj kiel Danny, la plej grava laboro de Danny, en lia rolo de la 3a sekretario en la aŭstralia ambasadejo, estis lia posteno kiel kultura konsilanto. Tia laboro enhavis kulturajn vizitojn kaj teatraĵojn. Dum la epoko de la registaro Hawke en Aŭstralio, unu postulo por ĉiu ministro estis viziti Ĉinujojn. Danny ankaŭ verkis gravajn raportojn pri la interrilato inter Ĉinujo kaj Aŭstralio. Ĉi tiuj restas en la naciaj arkivoj kun la raportoj pri la Aŭstralia-ĉina asocio.

La plej frua konscio de la inteligenteco de Danny estis lia stipendio al la kolegio

De La Salle kiam li estis nur knabo. Danny plenkreskis en malriĉa familio en la melburna antaŭurbo Richmond kaj forlasis la lernejon je la aĝo de nur 14 jaroj. Post laboro en banko, li studentiĝis en universitato en 1969.

Danny estis docento en la Universitato de Melburno kaj la Aŭstralia Nacia Universitato, kaj profesoro ĉe Universitato Macquarie. Ĉirkaŭ dudek studentoj kiuj

studis sub Danny skribis pri lia funda scio pri ĉinaj aferoj. La intelektuloj de Ĉinujo brakumis lin tiel, ke li povis vaste vojaĝi en la lando, kiun li amis.

Liaj studentoj ankaŭ skribis pri lia amikemeco. Ni ĉiuj konas la sinceran kaj facilan amikecon, kiu venis rekte el la koro de Danny.

La plej granda afero en la vivo de Danny estis Ye Xiaoping, al kiu li edziĝis en 1987. Dum la kultura revolucio de Ĉinujo, Ye estis sendita for en la kamparon por nutri porkojn kaj kreskigi rizon. Je la fino de ĉi tiu periodo, ŝi verkis ege gravan artikolon pri intelektuloj de la ĉina kaj la okcidenta mondo. Ŝia verko malfermis novan esplorkampon por generacioj da studentoj.

La morto de Ye Xiaoping en 2010 ŝokis Danny tiel ke li neniam estis la sama homo.

Ni salutas Danny Kane kiu ja rangas inter la plej eminentaj aŭstraliaj Esperantistoj de ĉiam.



# Sekvu nin en Instagramo

**DAVID RYAN (WELLINGTON)**

La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa) havas konton ĉe Instagramo. Pardonu, kio estas Instagramo? Nu, Instagramo (*Instagram* en la angla) estas senpaga programo por poŝtelefono, en kiu oni povas montri fotojn kaj vidbendojn. Konto povas esti videbla al ĉiuj, aŭ oni povas doni permeson nur al grupo de "sekvantoj", ekzemple amikoj, familianoj, ktp.

Mi komencis uzi Instagramon antaŭ proksimume du jaroj ĉar temas pri facila maniero por kundividi fotojn dum vojaĝoj... ĉu vi memoras kiam ni rajtis vojaĝi tutmonde? Anstataŭ sendi fotojn al dekoj da amikoj kaj familianoj per retmesaĝo aŭ Whatsapp, estas pli facile alŝuti foton el mia telefono al mia Instagramo-konto kaj ĉiuj miaj sekvantoj tie povas vidi ĝin kaj, se ili volas, ili povas fari komenton.

La konto de NZEA havas fotojn de niaj kongresoj, kaj... ĉu vi vidas tie foton de la sidneja havenponto? Kial aperas tiu foto en nia nov-zelanda konto? Do, mi rekomendas ke vi sekvu nin kaj vi trovos la kialon. Nia konto estas: **nzesperanto**. Multaj aliaj Esperanto-klubo kaj asocioj havas konton ĉe Instagramo, ekzemple **ueaesperanto**, **melb\_esperanto**, **esperanto\_nsw**, kaj multaj aliaj.



# Danĝera vivo de piloto

DAVID RYAN (WELLINGTON)

“Bonvenon al nia flugo al Londono,” mi diris per laŭtparola sistemo post nia deterigo. “Mi esperas ke vi ĝuos nian hodiaŭan ok-horan flugon”.

Do, finfine, mi estis piloto! Kiel knabo, mi ĉiam revis pri ĉi tiu momento. Nun, mi respondecis pri aviadilo kun 300 pasaĝeroj kaj 20 flugservistoj. Feliĉe, laŭ la vetera prognozo, ni havos facilan flugon al nia celo. La flugkompanio volis ke vicpiloto akompanu min, sed mi respondis, ke mi ne bezonas helpanton; la kompanio povas ŝpari iom da mono.

Pasis kelkaj horoj; mi trinkis kafon, kaj mi sidis sola en la pilotejo antaŭ la instrumentopanelo: indikilo por suĉopremo, oleomanometro, magneta kompas, ktp. Mi ne sciis kial oni bezonas tiom da instrumentoj, sed tio ne gravas. Mi sciis, ke mi devas nur stiri la aviadilon okcidenten, proksimume, pli malpli, iomete, kaj ni finfine atingos la flughavenon en Londono.

Subite mi sentis ke la vento plifortiĝas. Kion mi faru? Kion signifas la altometro kiam robota voĉo diras, “Danĝero, Danĝero, tro malalte”? Do, mi premis butonon kaj ŝajnis, ke ĉio renormaliĝas. Ne plu paniku! Pilotado estas tre facila tasko.

Post kelkaj minutoj kaj vizito al necesejo, mi sidis en la pilota sidilo kaj mi vidis lumojn en la horizonto. Ĉu urbo? Ne, ni ankoraŭ ne atingis Londonon. Mankas kelkaj horoj. La lumoj pligrandiĝis, kaj pligrandiĝis, kaj subite mi konstatis ke mi flugas rekte cele al alia aviadilo, pli granda ol la mia. Kion mi faru? Mi rigardis la oleotermometron, rivulometron, kaj

gasregilon. Mi fermis la okulojn, mi premis kelkajn butonojn, kaj... feliĉe mi vidis ke la lumoj de la alia aviadilo malpligrandiĝas kaj post nelonge malaperas. La piloto de tiu alia aviadilo devas esti stultulo!

Subite mi aŭdis strangan bruon. Per la fenestreto mi vidis ion strangan en la ĉielo. Ŝajnis kiel... ne, ne eblas. Mi vidis neidentigitan flugantan objekton! Mi kriis kun granda ĝojo. Ekde knabo antaŭ multaj jaroj, mi ĉiam revis pri ĉi tiu momento. Mi ĉiam volis esti la unua knabo en mia klasĉambro, kiu havas kontakton kun eksterteruloj.

Tiam per la radio mi aŭdis timigan malamikan voĉon: “Piloto de neidentigita flugo, ni estas dalekoj. Ni volas ekstermi vin. Ekstermu! Ekstermu!”. Panike, mi premis mil butonojn, de la giroskopa kapusindikilo, fuelmanometro, mapolampo, indikilo de baborda fuelujo, ktp. La aviadilo subite komencis tre rapide malalteniri spirale. Mi ne sciis kion fari. Mi komencis plori. Mi ĉiam volis esti piloto...

... kaj tiam mi aŭdis la voĉon de mia kara filino: “Paĉjo, mi ĝojas ke vi estas kontisto kaj ne vera piloto. Vi eĉ ne scias kiel funkcias pilota ludo en via poŝtelefono!”



# Ĉerizsupro

Dimanĉe la 17an de Oktobro John (Ĝono) Gallagher prezentis pri "Ĉerizsupro", la bona gastejo de si kaj sia partnero Lesley (Lenjo).

John (Ĝono n.1964) kaj Lesley (Lenjo n.1968) Esperantistiĝis en 1997 dum la 82a Universala Kongreso en Adelajdo. Ĝono desegnis la flagojn kiuj pendis en la stratoj de centra Adelajdo dum tiu kongreso. Ili translokiĝis al Tasmanio en 2000 kaj tie kreis bonan gastejon. Ilia filino Jasmino (n.1995) estas plentempa instruistino kaj loĝas en Launcestono.

## El la prezentado

Bonvenon al ĉi tiu mallonga prezento pri nia malgranda bieno sur la plej bela insulo de Aŭstralio. Mi ŝatus fari rapidan agnoskon al ĉiuj homoj, kiuj helpis nin lerni ĉi tiun mirindan lingvon.

Kiam mi malkovris Esperanton en 1997, min kortuŝis la aserto, ke "Lerni Esperanton estas kiel lerni biciklo. Post kiam vi lernis, vi neniam forgesos." Do post pli ol 20 jaroj kaj per malmulta praktiko mi nun povas kontroli la veron

## JOHN GALLAGHER (LILYDALE)

de ĉi tiu aserto. Kaj nun helpo de 'Google Translate' kaj aliaj mirindaĵoj de nia epoko neniam estis pli facile lerni Esperanton.

Ĉerizsupro estis la nomo, kiun ni donis al la translokebla domo, kiun ni aĉetis en 2002, ĉar ĝi havis ruĝan tegmenton. Kiam ni translokiĝis ĉi tien, ne estis arboj aŭ ĝardeno. Ni poste malkovris, ke la origina bieno estis multe pli granda kaj nomiĝis Aglo-Parko. Kaj tial ni nomis la kotbrikan domon, kiun ni konstruis en 2005, Eagle Park. Ĉi tiuj du domoj funkcias kiel turisma gastejo kaj estis tre sukcesaj parte pro la nomo Ĉerizo. Ĉerizoj estas tre popularaj kaj kunportas certan romantikismon. Bedaŭrinde la dezirindeco de ĉerizoj ne limiĝas al homoj. Insektlarvoj kaj birdoj ankaŭ ŝatas la ĉerizojn.

Ni kreskigas produktaĵojn organike ĉi tie kaj do preferas kultivi manĝaĵojn, kiuj ne bezonas insekticidojn. En 2007 ni plantis 250 avelarbojn kaj post tiu jaro komencis projekton de Komunuma Subtenita Agrikulturo. Dek klientoj pagas (anticipe) por dek skatoloj da legomoj kaj venas kolekti ĉiusemajne. Lesley estas



ĉefrespondeculo pri la ĝardenado kaj mi respondecas pri la traktoro, kiun ni aĉetis en 2007, kaj ankaŭ pri renovigaj laboroj, kiuj komenciĝis, laŭ granda maniero, ĉe la malnova loĝdomo en 2017. Tiu renovigo finiĝis ĝustatempe por la pandemio kaj la malrapidiĝo en internacia vojaĝo.

Tra la jaroj ni gastigas volontajn laboristojn, biciklantojn, kamploĝantojn, promenantojn. Homojn el la tuta mondo kaj el ĉiuj sociaj klasoj. Ili loĝas en tendoj, transformitaj porkejoj, konstruejoj kaj kompreneble niaj gastejoj. Lastatempe tendumado fariĝas pli populara ankoraŭfoje kaj, antaŭvidante tion, ni inkluzivis necesejon por kamploĝantoj en la konstruaĵo. Tridek tri homoj estas la maksimumo, kiujn ni havis ĉi tie dum unu nokto.

Tasmanio havas laŭsezonan klimaton; malvarman vintron kaj varman sekan someron. Lilydale situas en la nordoriento de Tasmanio. Printempo estas la plej aktiva tempo por ni, ĉar la kampherbo ekkreskas kaj ĉio devas esti fortondita por protekti nin dum la "fajrosezono". Ni tenas anserojn kaj kokidojn en la bieno kaj konforme al nia vegetara filozofio ni ne manĝas ilin. Ni manĝas nur plantobazitajn manĝaĵojn.

La ĉirkaŭa kamparo estas monteta kaj en la oriento estas la ikoneca Monto Arthur (1188 metrojn). Brown's Hill (monteto de Brown) estas ĉe nia sudo. Akvofaloj Lilydale, proksime al la vilaĝo, estas populara loko por viziti. La vilaĝo estas kampara servo-centro kun lernejo, kiun servas ses busoj dum lernejaj tagoj. La ĉirkaŭa regiono enhavas plejparte malgrandajn bienojn por paŝti kaj bredi bovojn, sed lastan jaron unu granda bieno transformiĝis al avelarboj. Ŝajnas, ke la tutmonda merkato por ĉi tiu nukso

kreskas kaj oni diras, ke la nuksoj estos uzataj en la bombonoj de Ferrero Rocher.

Ni uzas niajn nuksojn por fari nuksan lakton, dispremanta ĝin per adaptita semo-dispremilo. Tiu maŝino fabrikiĝis en 1864, ĉirkaŭ la samaj jaro kaj teknologio kiel la Ifel-Turo en Parizo. Ĉi tiu maŝino ankaŭ povas platpremi avenon per iomete da peno. Origine ĝin turnis ĉevalo aŭ vapormaŝino sed nun ni tiel ekzercas nin. La maŝino havas interesan historion. Ĝi estis fabrikita en Anglujo kaj transportita al Tasmanio en ligna boato. Ĝi estis en la sama bieno ne tre malproksime de ĉi tie kaj mi aĉetis ĝin en 2014 dum aŭkcio de bienaj posedaĵoj.

Nun mi prezentos al vi mian edzinon Lesley (Lenjo) kaj ni havas mallongan kvizon por vi. (Dum tiu parto Lenjo montris al la zumanoj\* legomojn el sia ĝardeno kaj la spektantoj devis diveni la nomojn de tiuj. Montriĝis bonaj ekzemploj de terpomo, karoto, brokolo, krispa brasiko, brasiko, laktuko kaj kukurbo.)

Mi ŝatus fini per kanto, kiu estas omaĝo al Esperantaj instruistoj tra la mondo, kiuj instigas siajn lernantojn levi la manojn. Mi petos Sandor dividi la ligilon al la antaŭregistrita filmeto:

[youtu.be/rbe86ZcfbBY](https://youtu.be/rbe86ZcfbBY)

Se vi deziras bonan ferion en paca medio bonvole mendu laŭ la jena informo:

**Cherry Top Farmstay, boutique eco-village**

Winner, National Farmstay Award  
(Gajninto de la Nacia Biengasteja Premio)  
+61 (0)3 6395 1167  
[cherrytopfarmstay.weebly.com](https://cherrytopfarmstay.weebly.com)

---

\* Zumanoj – partoprenatoj en la Zoom (zum) reta sesio.

# Plantoj konstruiĝas el aero kaj akvo

**DONALD ROGERS (WELLINGTON)**

Ĉiu semplanto komenciĝas kiel malgranda semo, kiu enhavas la DNA kiu regos kiel konstrui novan planton, ĉu ĝi estos ekzemple eta lekanto aŭ giganta sekvojadendro. De kie venos la atomoj el kiuj konstrui la novan planton? Paroli ĝenerale, la atomoj venos el la medio ĉirkaŭ la semo, el la grundo kaj el la aero. Tamen, semo tipe ankaŭ enhavas malgrandan stokon de amelo, oleo kaj proteino, kiujn la semo uzas por komenci kreski.

## Sunlumo kaj fotosintezo

Por konstrui la unuan radikon kaj la unuan ŝoson, la semo konsumas la stokon de amelo, oleo kaj proteino, rearanĝante la molekulojn. Por generi plu, ĝi bezonas foliojn kun klorofilo per kiu kunmeti novajn molekulojn. Ni konsideru la karbonhidratojn (ekzemple, sukero kaj amelo); ili konsistas el tri elementoj: karbono, hidrogeno kaj oksigeno. La

planto prenas karbonan dioksidon el la aero per la folioj, kaj akvon el la grundo per la radikoj. La magio, fotosintezo, okazas ĉe la klorofilo, en la verdaj strukturoj, kloroplastoj, en la ĉeloj en la folioj. La energio por instigi la reakcion venas, senpage, el la suno kiel lumo. Klorofilo rearanĝas la atomojn de karbona dioksido kaj akvo, produktante karbonhidratojn kaj oksigenon. La planto ellasas la oksigenon eskapi en la aeron. Oni povas diri, ke la planto konservas energion kiel sukerojn kaj amelon en siaj strukturoj.

Homoj kaj aliaj bestoj konsumas karbonhidratojn kaj enspiras oksigenon, kaj elspiras karbonan dioksidon kaj akvovaporon, kaj gajnas la kemian energion el la karbonhidratoj. Tio estas la inverso de la proceso en plantoj. Sunlumo necesas por peli la reakcion en plantoj, kaj bestoj utiligas la energion kiun plantoj konservas.

## Nitrogeno

Plantoj ankaŭ bezonas nitrogenon por konstrui proteinojn, DNA kaj aliajn gravajn kombinaĵojn por la novaj ĉeloj. Sepdek ok elcentoj de la aero estas nitrogeno, sed ĝi ne estas reakciema kaj plantoj ne kapablas utiligi ĝin rekte. Helpo venas ĉefe de specifaj bakterioj kiuj kapablas sorbi kaj utiligi aeran nitrogenon por produkti amoniakon, kaj nitraton, kiujn plantoj povas uzi.

Specifaj tipoj de plantoj formas simbiozon kun tiaj bakterioj. La plantoj gastigas



*Nitrogenonodetoj de fabo*

la bakteriojn en nodetoj en siaj radikoj kaj liveras al la bakterioj sukerojn kompanse por la nitratoj kiujn la bakterioj produktas. En niaj hejmaj ĝardenoj la fabacoj (faboj, pizoj, arakidoj, k.a.) kunlaboras kun la bakterioj nomitaj rizobio. Multaj specoj de planto ne kapablas fari tion.

Rizobiaj bakterioj en la grundo signalas al la radikoj de fabaco, ke ili ĉeestas kaj la planto produktas enzimon kiu malkomponas pektinon en la ĉelaj muroj por enlasi rizobion tra tiu muro. Tamen estas malfacile por aliaj tipoj de bakterio eniri, ĉar la planto strikte regas la aferon.

## **Sterko**

Plantoj ankaŭ bezonas malpliajn kvantojn da aliaj elementoj: kalio, fosforo, sulfuro, kalcio, magnezio kaj etajn kvantojn de la spurelementoj, fero, mangano, seleno k.m.a. Ili sorbas tiujn elementojn per la radikoj el la grundo, se ili troviĝas tie.

Por fekundigi la grundon, ĝardenistoj aldonas sterkon kiu enhavas taŭgajn kvantojn de la elementoj nitrogeno, fosforo, kalio, kaj ankaŭ la spurelementoj. Alia metodo estas kreskigi fabacojn kaj kiam la faboj aŭ pizoj estas rikoltitaj, enterigi la reston de la plantoj por ke ĝi putru. Kiam planto estas morta, malgrandaj senvertebruloj konsumas ĝin. Bakterioj kaj fungoj ankaŭ uzas la restaĵon. Ili liberigas kombinaĵojn, kiuj enhavas nitrogenon kaj fosforon, kaj tiuj estas uzeblaj de sekvaj plantoj. Aŭ oni povas kreskigi plantojn speciale por enterigi, ekzemple lupinojn. Oni nomas tion verda sterko. En posta sezono oni povas kreskigi plantojn kiuj bezonas la ekstran nitrogenon, ekzemple brasikoj aŭ terpomoj, kaj ili kreskos pli bone ol sen la ekstra sterko.

Alia metodo estas kolekti la restaĵojn de ĉiaj plantoj en stakon, kaj lasi ĝin putri por kelkaj monatoj kaj poste distribui ĝin tra la ĝardeno por sterki la grundon. Tion oni nomas kompoŝto.

Simpla etendo de la principoj jam menciitaj estas uzi kultivciklon. Tio estas kreskigi en specifa ĝardenparto unue fabacojn, por enkorpiĝi nitrogenon en la grundo, en posta sezono kreskigi en la sama loko ekzemple brasikojn, en plua posta sezono, radikajn legomojn (karotojn aŭ pastinakojn). Tiam kulturan rotacion oni inventis antaŭ almenaŭ 8000 jaroj. Diversaj partoj de la ĝardeno povas esti je malsamaj etaĝoj de la ciklo.

## **Simbiozo kun fungoj**

Iuj plantoj povas formi simbiozan rilaton kun specifaj fungoj. Ekzemple, la arboj piceo, abio kaj betulo povas kunlabori kun la muŝfungo *Amanita muscaria*. La planto produktas kaj donas al la fungo karbonhidratojn, kaj la fungo liveras al la planto akvon kaj mineralajn nutraĵojn, ekzemple fosforon kaj nitrogenon, kiujn ĝi prenas el la grundo. La partoj de la radikoj kiuj enhavas la fungon nomiĝas mikorizoj. Plejmultaj plantaj specioj (takse 80%) povas formi mikorizajn asociojn, kvankam iuj plantaj familioj ne kapablas, ekzemple brasikacoj (brasiko, brokolo) kaj kenopodiacoj (spinaco, diversaj betoj). La orkidacoj (orkideoj) ne povas vivi sen taŭga mikorizo.

La avantaĝo por la planto estas, ke la fungo povas pli forte sorbi akvon kaj mineralojn, parte ĉar la subtera funga reto estas pli fajna ol la plantaj radiketoj, kaj tial havas pli grandan surfacon, kaj povas penetri tra malgrandaj spacoj. Iuj fungoj povas sorbi mineralojn nehaveblajn al la plantaj radikoj. Mikorizoj estas tre

**Daŭrigata ĉe paĝo 21 >**

# Biologia nomenklaturu por Aŭstralio

**TERRY MANLEY (ARMIDALE)**

HONG Sungcho el Koreio prezentis en Septembro pri birdoj en la monata prelegserio de AEA. Ĝi estis bone prezentata prelego kaj instigis min kontakti al Sungcho pri la esperantaj nomoj por birdoj. Mi iom prilaboris tion en 2006 kiam mi prezentis kurseton pri naturo ĉe la somerlernejo de AEA. Mi havas libreton eldonita de Ray Ross en 1987 – *Esperanta-Aŭstralia Vortaro de Aŭstraliaj Birdoj*. Leginte la enkondukon de ĝi mi konstatis ke la vortaro “konformas al la birdlisto en *Komunlingva Nomaro de Aŭstraliaj Birdoj*, eldonita de la Aŭstralazia Sekcio de Ornitologia Rondo Esperantlingva (ORE), kompilita de Wre Chandler.”

Wre (konata kiel Ray angle) estis instruisto kiu iam verkis la korespondan kurson pri studoj naturmediaj por la NSKa edukadfako. En 1976 li ricevis la Esperantan premion de Simondetti por la dua fojo. Li estis la unua havi tiun honoron. En 1973 li ricevis ĝin por disertacio pri la Lovano (Mallee Fowl, *Leipoa ocellata*) kaj en 1976 pri la Malgranda Pingveno (Fairy Penguin, *Eudyptula minor*). Do kiel prezidanto de ORE li multe studis la birdojn. Wre mortis en 1984 tri jarojn antaŭ la eldono de la libreto kiu enhavis liajn birdnomojn.

Sekvas artikolo el *The Australian Esperantist* de Oktobro 1982 en kiu Ray provis instigi esperantistojn aŭstraliajn prilabori Esperantajn nomojn por bestoj kaj plantoj aŭstraliaj. En 2000 eldoniĝis la kvara eldono de la *Australasian Esperanto Dictionary*. Ralph Harry el Aŭstralio kaj Brian Fox el Nov-Zelando estas la ĉefaj aŭtoroj de la vortaro. En

ĝi estas nomoj por iuj el la plej konataj bestoj kaj plantoj el Aŭstralio kaj Nov-Zelando. Do ĝi estas komenco por listo tia sed la vortaro inkluzivas multe pli pri terminaroj aŭstralaziaj. Donald Rogers el Nov-Zelando interretigis la vortaron kaj ankoraŭ prizorgas ĝin. Vizitu [bit.ly/anzed](http://bit.ly/anzed)

Bona informilo por ni. Ekzemple kiam John Gallagher provis priskribi la beston kiu mortigas la kokinojn en Tasmanio, mi povis rapide konsulti la vortaron kaj trovis la nomon “Daziuro”, kiu estas la nomo por *Quoll*, kateca marsupiulo en la arbaroj en Tasmanio kaj ĉeftera Aŭstralio.

Do ree mi laboras pri la listo de birdoj. Mi jam enmetis 650 birdojn el ĉirkaŭ 750. Ĉu bezonata? Laŭ Wre, jes.

## **BEZONATA BIOLOGIA NOMENKLATURO POR AŬSTRALIO Wre CHANDLER**

*The Australian Esperantist*,  
Oktobro 1982

Kiam la unuaj eŭropanoj venis por loĝi en Aŭstralio ili vidis ĉion tra eŭropanaj okuloj. Ekzemple nigra kaj blanka birdo estis “Magpie” (Pigo), kvankam ĝi ne similas al la pigo de Eŭropo. Estas en Eŭropo unu specio de “Wren” (Troglodito). Ne malpli ol 110 specioj de birdoj en Aŭstralio portas la nomon “Wren”. Plejparte ili similas al la Troglodito nur pro tio, ke ili portas la voston vertikale. Komunlingve en Aŭstralio estas minimume 65 specioj de “Robin” (Rubekolo laŭ *P.I.V.*, Ruĝgorĝulo laŭ *Komunlingva Nomaro de Eŭropaj Birdoj*, 65 specioj de “Warbler” (Silvio), 59 specioj de “Tit” (Paruo), 58 specioj de “Thrush” (Turdo), 52 specioj de “Shrike” (Lanio) kaj multaj aliaj misnomitaj birdoj.


Plejparte tiuj birdoj ne parencas – eĉ ne similas – al la eŭropaj birdoj kies nomojn ili portas.

Mi estas vidinta en tradukitaj verkoj, ekzemple la nomon “Konuro” por niaj papagetoj. “Konurenoj” estas sub-familio de etaj papagoj en Sud-Ameriko. Tiuj nur supraĵe similas al niaj “Lorikitoj” (sub-familio “Lorenoj”). Mi estas vidinta “Monta Frakseno” por “Mountain Ash”. *Eucalyptus Regnans*, nia “Mountain Ash” estas unu el la plej altaj arboj en la mondo kaj ne similas al la eŭropa “Frakseno” eĉ supraĵe. Estas cetere alia “Mountain Ash” (*Panax sambucifolius*) kies sola simileco al Frakseno estas la formo de la folioj. Tiuj misnomoj estas multegaj. Ni ne kulpigu niajn antaŭulojn. Kiel mi diris, ili vidis ĉion tra eŭropanaj okuloj. Tamen estas bezonata “Biologia Nomenklaturpo por Aŭstralio”.

Jam preparita kaj en la mano de presisto, estas manuskripto *Komunlingva Nomaro de Aŭstrialiaj Birdoj*, far la Nomenklatura Komitato de la Aŭstrialia Sekcio de Ornitologia Rondo Esperantlingva. Por tio ni devis elekti el iom pli ol tri mil popularaj nomoj por 731 birdoj. Tiu tasko estis granda. Feliĉe mi estas emerita, kaj povis dediĉi al la tasko multe da tempo.

Multe pli da dediĉita laboro estos postulata por botanika nomenklaturpo. Pli ol ok mil florantaj plantoj troviĝas en Aŭstrialio. Cetere estas la mamuloj. Nur 320 el tiuj ekzistas en Aŭstrialio, kompare simpla tasko! Krome estas moluskoj, kaj dudek kvin aliaj klasoj de vivantaj estaĵoj, inkluzive – (ho diable!) – pli ol 35 000 specioj de aŭstrialiaj insektoj! Kredeble inter niaj merituloj estas tiuj kiuj kapablas komenci la taskon.

Biologia Nomenklaturpo por Aŭstrialio estas vere bezonata, eble ne urĝe. Tamen,



Wre Chandler

ne estas tro frue por komenci la taskojn. Tiuj, kiuj posedas la scipovon, kaj povos dediĉi la tempon, bonvolu pripensi la aferon.

## Komentoj pri BIOLOGIA NOMENKLATURPO POR AŬSTRALIO

La enigmo estas en kia formo kaj kien meti la listojn de floroj kaj bestoj? Kiel jam menciita, Donald Rogers metis iujn en la retejo de NZEA per la enmeto de la *Australian and New Zealand Esperanto Dictionary*. Li ankaŭ rekomendas enmetadon en Vikipedion, kiun multaj uzas rete. Kaj jen aliaj komentoj de Donald:

“Mi metis multajn birdojn en la tezaŭron ĉe [puzzlefoundry.com](http://puzzlefoundry.com), do mi havas daŭran intereson pri ili. Estus bone rete publikigi la listojn de Chandler kaj Ross. La ĝenerala problemo pri birdaj nomoj estas ke, de tempo al tempo, la fakuloj ŝanĝas iujn nomojn de specioj, genroj k.a. Ĉar ofte oni nomas ilin en Esperanto laŭ la genro, kion fari kiam la nomo ŝanĝiĝas?”

# Omaĝo al John W Adams 1933–2021

**GARY KAJ MARUMI SMITH (TORQUAY)**

Ni volas omaĝi al nia kara Esperanto-amiko John Wield Adams, kiu bedaŭrinde mortis je la 26a de Oktobro 2021 en Torquay, Viktorio. Post dungado en la banka kaj financa sektoroj, ĉefe en Melburno dum 40 jaroj, John kaj lia edzino Elrae translokiĝis al la apudmara urbeto, Torquay, kaj iĝis ĉampionoj de artaj agadoj dum la sekvaj 20 jaroj.

John estis konata kiel penema sekretario de la Adam Lindsay Gordon Commemorative Committee Inc., eldonante ilian retan bultenon *The Wayfarer* ekde 2007 ĝis sia morto. Ĉiun jaron, je la Froth and Bubble Day (Tago de Ŝaŭmo kaj Bobeloj), la membroj legis poemojn de Gordon antaŭ ties statuo en Spring Strato, Melburno, kaj celebris per flavaj floroj de akacio, ŝaŭmo de kafo kun kremo, kaj bobeloblovantaj infanoj. Samtempe, John kaj Elrae komencis lerni Esperanton por stimuli la cerbon dum sia emeriteco. Bonŝance ekzistis tre aktiva Esperanto-klubo en Torquay fondita de la familio Lutz (Miranda, Carol kaj Andrew) en 2000. John kaj Miranda fondis teatraĵon nomita *AQUA sur la plaĝo de Cozy Corner*, kune kun loka cirka trupo de lernantoj, kiuj turnis brulantajn bastonojn dum Miranda deklamis kiel Diino de la Luno en Esperanto. Ĝi estis parto en la Festivalo de Alta Tajdo kiun la loka registaro (Surf Coast) monsubtenis. Grupo de ĉirkaŭ dekkvin esperantistoj, portantaj T-ĉemizojn kun Esperantaj verdaj steloj, marŝis en la festivala parado tra la Esplanado al la ĉefstrato de Torquay.

Sciante ke la Alta Tajda Komitato dissolviĝos en la sekva jaro, John kaj Elrae tiam organizis la Froth & Bubble

Arts Festival (Artfestivalon de Ŝaŭmo kaj Bobeloj), kiu akiris ian stipendion de la loka registaro. La sukcesa festivalo laboris kun lokaj verkistoj, la lernejoj, la bibliotekoj, la Ĝardeno Socio de la Komunumo Danawa, kaj aliaj kulturaj organizoj. Prezentaĵoj en Esperanto estis parto de la programo.

En 2014, la TEKK (Esperanta Kafoklubo de Torquay) faris monkollekton por helpi la mongolan Esperanto-komunumon post ekstrema vintro, kiu mortigis milionojn da hejmaj bestoj pro temperaturo sub minus 50 gradoj. Ekde tiam, la jara donaceto al la mongola E-komunumo daŭris ĝis 2020 per Oomoto Internacia en Japanujo.



*John W Adams ĉe la statuo de Adam Lindsay Gordon*

John kaj alia kunfondanto de la Societo de Adam Lindsay Gordon, Travis Seller publikigis la Enciklopedion de Adam Lindsay Gordon en Februaro 2019. Elтирао de la libro, kiun John preparis per PowerPoint, estis prezentata en Marto 2020 en la virtuala prelegserio de AEA per la Torquay-membroj.

Resume, John kaj Elrae estis trankvile sukcesaj, plifortigante kulturajn agadojn

tra komunumoj en Aŭstralio. Ĉiujare ili trankvile vizitis la Ĝeneralan Tombejon de Brighton por purigi la tombejon de Adam Lindsay Gordon kaj plantis flavan akacion, omaĝante la vivon de Gordon.

Postvivas lin lia edzino Elrae, kvar infanoj, Jo, Vivinne, Ian kaj Christine, 7 genepoj kaj 6 pragenepoj. Ilia humanisma laboro estos daŭrigata de la Esperanto Komunumo kaj la Asocio Adam Lindsay Gordon.

---

## ➤ *Plantoj konstruiĝas el aero kaj akvo* – **daŭrigata de paĝo 17**

avantaĝaj por la planto en grundo malriĉa je nutraĵo aŭ akvo. Oni taksas ke inter 10% kaj 30% de la nutraĵo farata de plantoj iras al la fungo.

En iuj mikorizaj sistemoj, la fungo konektas individuajn plantojn per mikorizaj retoj kiuj transportas akvon, karbonon, kaj aliajn nutraĵojn rekte de ĉiu planto al aliaj.

Mikorizoj ankaŭ helpas la planton rezisti insektojn. Kiam afido atakas iun planton, tiu planto signalas al konektitaj plantoj pri sia kondiĉo. Ĝi ankaŭ eligas volatilajn kemiaĵojn en la aeron, kiuj allogas la predantojn de la afido. La konektitaj plantoj ankaŭ eligas la kemiaĵojn. Tio helpas la mikorizan fungon ĉar forpreno de nutraĵoj, age de insektoj, malhelpas la fungon.

En la mezo de la deknaŭa jarcento, oni rimarkis asociojn de fungoj kun la radikoj de plantoj, sed estas nur en la dudekunua jarcento, ke oni sisteme esploras pri ili kaj ellaboras kiel ili funkcias. Nun farmistoj komencas aldoni taŭgajn fungojn al siaj grundoj por plibonigi la plantan kreskadon. Estas interese, ke oni uzas scion tre modernan kaj scion tre antikvan por plibonigi la rikoltojn. Nun sciencistoj esploras tripartiajn simbiozojn inter planto, mikorizo kaj rizobio. Fruaj rezultoj indikas ke, en situacio kie la niveloj de nitrogeno

kaj fosforo en la grundo estas malaltaj, la plantoj kreskas pli bone kun mikorizo kaj rizobio ol kun nur rizobio aŭ nur mikorizo.

## **Plua legado**

En Vikipedio sub la titoloj: Fotosintezo, Mikorizo, Nitrogena ciklo, Nitrogena fiksado.

## **Glosaro**

**amelo** – starch

**amoniako** – ammonia (NH<sub>3</sub>)

**brasikacoj** (planta familio) – *Brassicaceae*

**fosforo** – phosphorus (P)

**kalio** – potassium (K)

**karbonhidrato** – carbohydrate

**kenopodiacoj** (inkludas spinacon kaj diversajn plantojn kiuj toleras salon) – *Chenopodiaceae*

**klorofilo** – chlorophyll

**kompoŝto** – compost

**lekanto** – daisy

**mangano** – manganese (Mn)

**nitrogeno** – nitrogen (N)

**nitrato** – nitrate (NO<sub>3</sub>)

**rizobio** (speco de bakterio) – *Rhizobium*

**sekvojadendro** – redwood tree

**seleno** – selenium (Se)

**simbiozo** (intima kunvivado de du aŭ pluraj specioj de vivuloj kun reciproka avantaĝo) – symbiosis

**spurelemento** (elemento kiu ĉeestas en etaj kvantoj) – trace element

**sterko** – manure, fertiliser

# Aŭstralia/Nov-Zelanda Hibrida Kongreso kaj Somerkursaro • 7–13 januaro 2022

La plej grava E-movada evento en 2022 por nia parto de la mondo okazos en januaro ĉe Esperanto-Domo, Sidnejo (143 Lawson St, Redfern NSW), kaj rete, per Zoom.

Pli specife, ĝi okazos ĉiutage inter sabato, la 8a de januaro, 11:00, kaj merkredo, la 12a de januaro, 21:00.

La sekvan tagon, ĵaŭdon, la 13an de januaro okazos (nur por ĉeestantoj) ekskurso al Muzeo de Nuntempa Arto (MCA) kaj Manly (per pramo).

## Kiom ĝi kostos?

Membroj de AEA aŭ NZEA rajtas partopreni senpage (tamen bonvole konsideru kontribui per donaco). Por nemembroj, la rekomendita donaco estas AUD 75.00 por la tuta kongreso, aŭ po AUD 20.00 tage.

## Somerkursaro

Okazos formalaj klasoj (kun mondfama instruisto Alekso Miller) por progresantoj dum la matenoj: kurso pri eblaj malfacilaĵoj de Esperanta gramatiko.

Alekso Miller (fotita) estas la vicprezidanto de Esperanto-USA kaj la fondinto de ĝia Usona Bona Film-Festivalo. Li daŭre instruas Esperanton per lecionoj kaj mallongaj Esperanto-filmoj en

sia populara kanalo en YouTube, *Exploring Esperanto*, ekde 2016. Li magistriĝis pri angla instruado (M.Ed) kaj bakalaŭriĝis (B.A.) pri aktorado ĉe la Universitato Liberty en Virginio kaj nuntempe laboras en filmoj kaj televidprogramoj en Atlanta, Georgio..

Por tiuj, kiuj preferas ne partopreni formalan kurson, okazos ĉiutaga sesio, kun “temo de la tago” por diskuti. Nova faciliganto gvidos la diskuton ĉiun tagon.

## Tranoktado en Sidnejo

Ĉiu ekster-sidneja kongresano devos organizi sian propran tranoktadon. Ni rekomendas la **Kolegion Sancta Sophia**, 8 Missenden Rd, Camperdown (plaĉa duonhora piediro for de Esperanto-Domo). Unuopa ĉambro kun propra banĉambro kostas po \$109 nokte, kaj duopa ĉambro kun propra banĉambro (limigita havebleco) kostas po \$130 nokte.

Estas retpaĝo kun pli da informo kaj bildoj: <https://bit.ly/stayatsanctasophia>. Tamen, ignoru la mesaĝon pri “no vacancies”. Anstataŭe, por mendi, skribu (en la angla, kompreneble) al Hayden Edwards ĉe [conference@sancta.edu.au](mailto:conference@sancta.edu.au).

## Aliĝi

Iru al [esperanto.org.au/kongreso](https://esperanto.org.au/kongreso)



# Australian Esperanto Association

GPO Box 2122  
Melbourne VIC 3001  
Australia

esperanto.org.au  
info@esperanto.org.au  
(07) 4696 9293

Sandor Horvath | **President**  
Jonathan Cooper | **Vice-President**  
Heather Heldzingen | **Treasurer**  
Joanne Johns | **Secretary**

**Committee Members:**  
Terry Manley, Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, teaching, and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



Ivan Pivac | **President**  
Chris Krageloh | **Vice-President**  
David Ryan | **Secretary/Treasurer**  
Dave Dewar | **Assistant Secretary**

**Committee Members:**  
Erin McGifford, Bradley McDonald

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

# New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140  
Symonds Street  
Auckland 1035  
New Zealand

www.esperanto.org.nz  
esperantonewzealand@  
gmail.com  
0800 350 781

# What is this?

Have you picked up this magazine by chance and are wondering what language it is? It might look a bit like Spanish, but it's actually Esperanto.

## What is Esperanto?

Esperanto was specially planned and created as a neutral second language for people all over the world. So, if you come across someone from, say, Finland, you wouldn't have to speak Finnish and they wouldn't have to speak English.

Originally developed in the 1880s, Esperanto is currently experiencing a resurgence, with more and more people discovering and learning it online. It's spoken in over 100 countries and there are thousands of Esperanto clubs worldwide.

Esperanto is much easier to learn than any national language, because it was designed to be easy to learn. It's completely phonetic, and its grammar is logical and regular.

You can use Esperanto for travel, information, friendship, hobbies, and even business. The World Esperanto Association publishes a list of names and addresses of people who are happy to have you stay with them for free if you speak Esperanto.

The internet makes it easy to connect to Esperanto speakers in any country. Google, Facebook, Firefox and Linux all support Esperanto. There's an Esperanto version of Wikipedia, which has over 300 000 articles (more than the Hebrew version, for example).

## Isn't English enough?

National languages like English give an unfair advantage to their native speakers. People who have studied English for over ten years still feel at a disadvantage when talking with a native speaker.

Interested? See the contact details on the inside back cover.

